
Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 10 Decembro 2021



# VENTO

## Veksilologia revuo en esperanto

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: cordoba@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

**ENHAVO** **Paĝo**

| | |
|---|---|
| La Usona Flago, influita kaj influanta simbolo | 3 |
| Itala Trikoloro | 12 |
| La Belga Flago, ĉu laŭ-konstitucia? | 16 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 18 |
| La fotografaĵo de niaj legantoj | 21 |
| Kiel faldi flagojn | 22 |
| Demarŝoj por la fondiĝo de Veksilologia Faka Asocio | 23 |
| Tokio'64 kaj Meksiko'68. Flagoj kaj Olimpikoj | 24 |
| Veksilologia kuriozaĵo | 27 |
| La angulo de la blazonoj: *Moldavio* | 28 |
| Flagoj kaj Poŝtmarkoj: *Kiam ŝtato malaperas* | 30 |
| Trovu la eraron! | 32 |
| VENTO jam atingis sian 10-an numeron | 33 |
| Kiel kunlabori kun VENTO | 34 |
| Veksilologia Humuro | 35 |


*Kovrilo: Esperanto-flago flirtanta en la velŝipo "Argo" . Haveno de Ajamonto (Onubo) Hispanio. Kontraŭkovrilo: Afiŝo por diskonigi la okazigon de la Unua Esperantista Laborista Kongreso. Parizo 1914. Bedaŭrinde, pro la komenco de la unua mondmilito ĝi ne okazis.*

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentantaj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# La Usona Flago, influita kaj influanta simbolo

*José M. Rodríguez (Hispanio)*

La dua Kontinenta Kongreso, okazinta la 14-an de junio 1775, deklaris, ke, *la flago de la dek tri unuiĝintaj ŝtatoj estas dek tri strioj alterne ruĝaj kaj blankaj kaj dek tri blankaj steloj sur blua fono, ili reprezentas novan konstelacion.* Oni verkis abunde pri la ĝusta origino de ĉi tiu simbolo, tio estas pri la influoj ricevitaj de la flago de Usono.



Tradicie, oni konsideras, ke la aŭtoro de la usona flago estis Betsy Ross

Oni diras, ke la origino de la usona flago eble troviĝas en tiu de la "Filoj de Libereco", politika grupo kreita de usonaj patriotoj kiuj luktis kontraŭ la Brita Imperio. Tiu grupo ekuzis en la jaro 1767 flagon kun la nomo "la ribelemaj strioj". Sur tiu flago aperis naŭ vertikalaj strioj, kvin ruĝaj kaj kvar blankaj, kiuj reprezentis naŭ patriotojn kiuj fondis la grupon.

Aliaj historiistoj trovas la originon de la usona flago en la familia blazono de George Washington. La unua usona prezidanto ŝatis heraldikon, li eĉ uzis sian familian blazonon kiel ekslibrison. Ene de tiu blazono aperas ruĝaj kaj blankaj strioj kune kun steloj.




Flago de la "Filoj de Libereco"



Blazono de la familio Washington

En la jaro 1937 la brita historiisto Charles Fawcett diris, ke ebla origino de la usona flago estis tiu de la Brita Orienthinda Kompanio. Temis pri akcia kompanio kiu ricevis de la brita reĝino la monopolon pri ĉia komerco en Orientaj Indioj. Ĉi tiu kompanio flirtigis en siaj ŝipoj flagon kun dek tri ruĝaj kaj blankaj strioj kun brita flago ĉe la supra-maldekstra parto. Verdire, la unua flago ekuzita dum la unuaj jaroj de la usona revolucio kontraŭ la Brita Imperio estis tute simila al tiu de la Brita Kompanio, tamen, pro la fakto, ke la brita flago aperis ene de tiu standardo, la ribelantoj decidis anstataŭigi tiun angulon de la flago per dek tri blankaj steloj sur blua fono.


Ĉi tiu lasta teorio pri la origino de la usona flago povas esti prava, ĉefe ĉar ŝajnas ne logike aperigi dek tri striojn kaj dek tri stelojn por reprezenti saman aferon, tio estas: la nombro de ŝtatoj. Do, se la usona flago baziĝas sur alia jam ekzistanta standardo, kiel tiu de la Brita Orienthinda Kompanio, kaj ĉi tiu flago jam uzis dek tri striojn, verŝajne la dek tri unuaj sendependaj kolonioj reale estas reprezentantaj sur la usona flago de la stelaro kaj ne de la strioj.



Flago de la Brita Orienthinda Kompanio


Tamen, kompreneble, ĉi ĉio estas nur teorio pri la influoj ricevitaj de la usona flago. Sed, kio rilate al usona flago kiel influanta simbolo en aliaj standardoj? Ĉu la usona flago estis uzata por krei aliajn simbolojn? Jes, jen kelkaj el ili:

**LIBERIO**: en la jaro 1822 la Usona Societo pri Koloniigado aranĝis teritorion en Afriko por revenigi liberigitajn usonajn sklavojn. Verdire tiuj eks-sklavoj neniam integriĝis en la afrikan teritorion, ili estis konataj de la najbaraj popoloj kiel *"la amerikanoj"*. En la jaro 1847 tiuj usonaj kolonoj sendependiĝis kaj kreis novan ŝtaton, nome: Liberio. La nomo mem jam memorigas la originon de la lando. La politika sistemo kaj multaj aliaj karakterizaĵoj de Liberio estis tute similaj al tiuj de Usono, ekzemple, la ĉefurbo de Liberio ricevis la nomon *Monrovio*, omaĝe al usona prezidento James Monroe (1758-1831). Same, rilate la flagon de la nova afrika ŝtato, tie aperis dek unu alternaj ruĝaj kaj blankaj strioj kaj sola blanka stelo sur blua fono, je la sama pozicio ol la usona flago. Sur la liberia flago aperas dek unu strioj anstataŭ dek tri pro la fakto, ke dek unu estis la subskribintoj de la Liberia Deklaracio de Sendependenco.




Flago de Liberio

**TEKSASO**: kiam en la jaro 1821 Meksiko definitive sendependiĝis de la Hispana Regnolando, Teksaso estis teritorio en la nordo de tiu nova amerika ŝtato. Cele provizi per loĝantaro tiun regionon, Meksiko favorigis la alvenon de novaj kolonianoj, plejmulte el ili usonanoj. En la jaro 1836 la teksasanoj ribeliĝis kontraŭ Meksiko kaj en tiu jaro Teksaso fariĝis nova sendependa ŝtato. Sur la unua teksasa flago, kiel sendependa ŝtato, aperis sola flava stelo sub blua fono. En la jaro 1838 teksasa senatano William H. Wharton prezentis leĝon kun la celo adopti novan flagon. Tiu nova flago baziĝis sur la jam ekzistanta usona flago, kvankam sur ĝi aperis nur unu stelo, kompreneble ĉar temis pri sola ŝtato. La uzo de tiu nova flago jam anoncis la estonton de la sendependa Teksaso, tio estas, ties integriĝo en la najbaran Usonon, tio okazis fine en la jaro 1846.



Flago de Teksaso 1836 - 1845




Flago depost 1845

**HAVAJO**: la insularo Havajo, unuamomente, estis reĝlando fondita en la jaro 1810 de la reĝo Kamehameha la 1-a. Malgraŭ tiu sendependa statuso, kaj Britio kaj Usono deziris influi en la politika vivo de la insularo, ĉar temis pri strategia teritorio meze de la Pacifika Oceano. Ambaŭ ŝtatoj eĉ sendis tie soldataron kiam en la jaro 1874 nova reĝo kaj la vidvino de la ĵus-forpasinta reĝo ekigis lukton.

Fine, en la jaro 1893 puĉo aŭspicita de ter-havantaj usonanoj abolis la monarkian sistemon kaj oni proklamis novan respublikon kiu ekzistis ĝis la jaro 1898, tiam Havajo estis aneksita al Usono, post akordo inter reprezentantoj de la insularo kaj la usona ŝtat-sekretario.


Pri la origino de la havaja flago, kiel dirite komence de la 19-a jarcento Britio kaj Usono deziris influi en la politika vivo de la Havaja Regnolando. La insularo uzis neniun propran flagon, do, unuamomente la havaja reĝo Kamehameha la 1-a uzis la britan flagon, kiu estis donacita al li de brita esploristo George Vancouver. Siafoje, la usonaj reprezentantoj en Havajo same donacis al la havaja reĝo usonan flagon.



Flago de Havajo

Por eviti disputojn inter la reprezentantoj de ambaŭ ŝtatoj en Havajo, ĉefe en la jaro 1812 kiam Britio kaj Usono batalis ĉe la kanada landlimo, la havaja reĝo decidis ne uzi tiujn donacitajn flagojn kaj adopti propran standardon por la insularo. La nova havaja flago verdire estis miksaĵo inter tiuj de Britio kaj de Usono.

**BRETONIO:** temas pri regiono en norda okcidenta parto de Francio, apud Atlantiko. La bretona kulturo estas tre malnova, tie stariĝas megalitoj de la jaro 2000 a.K. Bretonio estas konsiderata kiel unu el la ses keltaj nacioj. Post la unua mondmilito aperis naciisma politika movado favore al la revivigo de la bretona kulturo, ĉefe rilate la lingvon. En 1927 fondiĝas la Bretona Aŭtonomista Partio, kelkajn jarojn antaŭe, en 1923, Morvan Marchal, unu el la ĉefaj bretonaj naciistoj, kreis la nuntempan bretonan flagon, bazita sur tradiciaj nigra kaj blanka koloroj de la mezepoka bretona armeo.



Flago de Bretonio

La aŭtoro de la flago tiris inspiron el la flagoj de Usono kaj Grekio, konsiderataj de li kiel la luliloj de la libereco kaj la demokratio. La strioj reprezentas la bretonajn provincojn kaj sur la supra kantono aperas la simbolo de la bretona duk-lando.

***BIKINI* ATOLO:** temas pri atolo en la Marŝala Insularo. Ĝi konsistas el 23 insuloj kun centra laguno. Post la fino de la dua mondmilito, la usona registaro decidis fari tie provojn pri nukleaj armiloj por pristudi ilian detruan potencialon. Entute okazis 67 testoj inter la jaroj 1946 kaj 1958, kelkaj el tiuj atom-bomboj estis 7000-oble pli potencaj ol tiu falita sur Hiroŝimon. Por realigi tiujn testojn la usona armeo forpelis la enloĝantojn el la atolo. Tiam, la estro de la atolo diris jenajn vortojn al usona milita ŝipestro: *"Men otemjej rej ilo bein anij"* (Ĉio restas en la manoj de Dio).




Flago de *Bikini* Atolo

Tiu frazo nun aperas sur la bikina flago. La flago estis adoptita en la jaro 1987, ĝi tute similas al la usona flago, por memorigi al tiu registaro siajn devojn kun la bikinanoj. La 23 blankaj steloj aperantaj sur la flago reprezentas la insulojn de la atolo; tiuj tri nigraj steloj estas la tri insuloj tute detruitaj dum la armilaj testoj. La du nigraj steloj aperantaj sur la suba parto estas la steloj kien devis foriri la enloĝantaro de la atolo.

**KUBO**: en la jaro 1849 kelkaj kubaj patriotoj, ekziliitaj en Novjorko, planis ekigi ribelon cele la sendependiĝon de la insulo. Unu el ili, la venezuela Narciso López, imagis flagon kiu baziĝas sur la usona flago, kvankam kun propra signifo. La bluaj strioj reprezentis la tri departementojn en kiujn la insulo estis dividita kaj la blanka strio signifis purecon. La ruĝa triangulo reprezentas la sangon elverŝitan dum la liberiga lukto kaj fine la blanka stelo reprezentis la deziron fariĝi plia ŝtato en Usono. Estas necese diri, ke la movado de la patrioto Narciso López celis la integriĝon de Kubo en Usonon. Tiel, en la jaro 1850, kun la helpo de Usono, oni organizis surteriĝon de kubaj patriotoj en la insulo kaj tiam oni uzis unuafoje tiun flagon. Tiu atako fiaskis.

En la jaro 1868 Carlos Manuel de Céspedes renkontiĝis kun pliaj kubaj patriotoj por ekigi lukton interne de la insulo, cele atingi la sendependecon de Hispanio. Céspedes memoris la kolorojn kaj formojn de la flago de Narciso López, por dezajni alian novan kiu estis uzata dum tiu ribelo. Ekiĝis tiam en la vilaĝo *Demajagua* la "Dejara Milito", pro tio la flago pripensita de Céspedes estas konata kiel "la flago de *Demajagua*".

Kvankam verdire la oficiala flago de Kubo estas tiu kiu dezajnita de Narciso López en la jaro 1849, la flago de Carlos Manuel de Céspedes nuntempe prezidas la kuban parlamenton.



Nacia flago de Kubo — Kuba blazono — Flago dezajnita de Céspedes

Ĉi tiuj simboloj prezidas la Kuban Parlamenton

**PORTO-RIKO**: ni jam diris, ke la kuba flago naskiĝis por reprezenti movadon kiu celis integri la insulon en Usonon, sed fine ĝi fariĝis simbolo de sendependa ŝtato. Rilate la insulon Porto-rikon okazis tute kontraŭe. Temas pri simbolo pripensita por sendependa ŝtato kiu fine fariĝis flago de teritorio asociita al Usono. La movado por sendependigi la insulon en Porto-riko naskiĝis en la jaro 1892 ĉirkaŭ la patriotisma movado de Kubo. La ĉefa luktanto favore la kuban sendependiĝon, José Martí, celis la liberigon de ambaŭ insuloj (Kubo kaj Porto-riko), pro tio ambaŭ flagoj, kuba kaj portorika, tute similas rilate striojn, stelon kaj kolorojn, kvankam koloroj reale aperas inversigitaj en la porto-rika flago rilate la kuban standardon.



Flago de Porto-riko


**FILIPINOJ:** sur la filipina flago aperas nek strioj alterne ruĝaj kaj blankaj, nek blankaj steloj sur blua fono, tamen sur ĝi aperas la koloroj blanka, ruĝa kaj blua, videblaj ankaŭ sur la usona flago. Do, kiu rilato ekzistas inter ambaŭ flagoj?

La dezajno de la filipina flago estis farita de la generalo Emilio Aguinaldo, kiam li ekziliiĝis en Honkongo en 1897, tiutempe Filipinoj estis hispana kolonio. Laŭdire la blanka triangulo signifas egalecon; la blua kampo volas montri la pacon, veron kaj justecon; kaj la ruĝa patriotismon kaj bravecon. La ok sunradioj reprezentas la ok unuajn provincojn ribelintajn kontraŭ la koloniisma regado. Fine, tri steloj reprezentas la geografian dividon de la insularo.

Sed, estas necese diri, ke okaze de la Deklaro pri Sendependiĝo de Filipinoj, proklamita la 12-an de junio de 1898, sur la fina parto de la teksto aperas jeno:

"*... kaj la koloroj blua, ruĝa kaj blanka festas la flagon de Usono kiel elmontro de nia profunda dankemo al ĉi tiu Granda Nacio pro ties ne-interesita protekto, kiun ĝi havigas kaj daŭre havigos al ni.*"


Do, kvankam verdire la koloroj de la filipina flago estis uzitaj antaŭ la interveno de Usono en la liberiga milito de Filipinoj favore ties sendependiĝon, okaze de la solena akto, tio estas la subskribo de akto por proklami la naskiĝon de la insularo Filipinoj kiel ŝtato, oni agnoskis, ke tiuj koloroj ankaŭ montris la dankemon de tiu lando al Usono.



Flago de Filipinoj

Kelkaj pliaj flagoj tra la mondo uzas blankajn kaj ruĝajn strioj kune kun steloj, tamen ne ĉiuj ili ricevis influojn de la usona flago, aŭ almenaŭ rektan influon, malgraŭ la simileco inter tiuj flagoj. Jen kelkaj el ili:


**MALAJZIO**: unuavide la malajza flago estas preskaŭ simila al tiu usona, tamen verdire la azia flago ne ricevis influojn de la nordamerika. Kiel jam dirite la unua flago kiu uzis dek tri striojn, alterne blankajn kaj ruĝajn, estis tiu de la Brita Orienthinda Kompanio. Malajzio estis teritorio ade vizitata de la ŝiparo de la Brita Kompanio, krome laŭ reĝa statuso havigita al tiu komerca kompanio, iliaj ŝipoj rajtis flirtigi la flagon de la kompanio nur kiam ili troviĝis en Azio. Do, temis pri flago tre bone konata en la havenoj de tiu kontinento, kompreneble ankaŭ en la tuta malazia duoninsulo.



Flago de Malajzio

Sur la malajza flago ne aperas blankaj steloj, sed duonluno kiel simbolo de Islamo kaj stelo, kiu reale estas la planedo Venuso, kies pintoj reprezentas la malajzajn ŝtatojn.

**ĈILIO**: unuavide oni povus aserti, ke teksasa kaj ĉilia flago havas saman originon, ĉar ambaŭ estas preskaŭ similaj. Tamen, tio ne estas vero. Dum la lukto cele la sendependiĝon de Ĉilio en la jaro 1817, argentina patrioto pripensis flagon bazita sur antikva verkaĵo kiu kantis la heroaĵojn de la Araŭka popolo. Do, aperis la unua flago flirtigita de la ĉiliaj patriotoj, ene de ĝi videblis tri strioj: blua, blanka kaj ruĝa. Al tiu flago oni aldonis blankan stelon, memore al tiu nomita: "Stelo de la Araŭkoj", reprezentaĵo de la planedo Venuso. Do, videble neniu rilato ekzistas inter la teksasa kaj la ĉilia flagoj.



Flago de Ĉilio

# Itala Trikoloro

*Cristina Bollini (Italio)*

Nun, Italio estas Unuigita Respubliko, sed, ekde la jaro 1700 ĝi estis dividita en multajn malgrandajn reĝolandojn kaj respublikojn, kiuj havis malsamajn flagojn, sed preskaŭ ĉiuj ruĝa-blank-verdaj, kiel la hodiaŭa Trikoloro. La itala flago, kiel ni ĝin konas hodiaŭ, estis oficialigita la 7-an de januaro 1797 en Reggio Emilia, fare de la Parlamento de la Cispadana Respubliko. La deputito Giussepe Compagnoni oficiale proponis, ke *"la Standardo aŭ Cispadana Flago komponita de tri koloroj, verdo, blanko kaj ruĝo, fariĝu universala kaj ĉi tiuj tri koloroj estu uzataj ankaŭ sur la Cispadana Kokardo, kiun ĉiuj devas porti"*.

La formo de la flago (trikoloro kun vertikalaj strioj) klare venas de franca inspiro ĉar, en la jaro 1796, la Napoleonaj armeoj trairis Italion, starigante multajn malgrandajn respublikojn, kiuj adoptis ĉi tiun modelon.

Iom post iom, al franca armeo aliĝis "italaj" taĉmentoj, precipe tiuj de la "Regiono Lombardia", kiuj utiligis kolorojn blanka-ruĝa-verda; blanko kaj ruĝo estis la koloroj de antikva blazono de la urbo Milano, dum verdo estis la koloro de la uniformoj de Milana Civila Gvardio.



Fotografaĵo de la nura kokardo ankoraŭ ekzistanta, nuntempe ekspoziciita ĉe la Eŭropa Studenta Muzeo en Bolonjo.

La unua sciigo pri la nunaj koloroj venas de la jaro 1794, kiam Luigi Zaniboni kaj Giovanni Battista de Rolandis, studentoj ĉe la Bolonja Universitato, gvidis ne-sukcesan klopodon liberigi la urbon de la papa regado. Ili uzis kiel simbolon verd-blank-ruĝajn kokardojn.


El la kuniĝo de la Cispadana Respubliko kun la Transpadana Respubliko la 29-an de junio 1797, rezultis la naskiĝo de la Cisalpa Respubliko, kiu adoptis Trikoloron, kiel ni vidas ĝin hodiaŭ.

*“La flago de Cisalpa Nacio konsistas el tri strioj paralelaj al la stango; verda, la sekva blanka, kaj la tria ruĝa. Simile flagostango estas spirale trikolorigita, kun blanka pinto”*

(Rezolucio de la Granda Konsilio de la Cisalpa Respubliko)



Flago de la Cispadana Respubliko




Flago de la Cisalpa Respubliko

De la jaro 1802 ĝis 1805 Cisalpa Respubliko fariĝis Itala Respubliko, kvankam subordigita al Francio, tiam la trikoloro estis anstataŭigita per alia flago, sur kiu oni vidas verdan kvadraton, ene de blanka rombo sur ruĝa fono. La nuna Standardo de la Respublika Prezidanto havas sian originon en tiu antikva flago. Okaze de la fondiĝo de la Regno de Italio (1805-1814) la simbolo de la reganta familio eniris en la flagon.

*“Flago de Itala Respubliko estas formata de kvadrato kun ruĝa fono, ene de kiu troviĝas rombo kun blanka fono, kiu entenas alian verdan kvadraton”*

(Dekreto pri la adopto de la flago de la Napoleona Itala Respubliko)



Flago de la Itala Napoleona Respubliko



Flago de la Reĝolando Italio 1805 -1814

Malvenko de Napoleono provokis la restarigon de absolutismaj monarkioj kaj samtempe oni abolis la trikoloron. En la Lombard-Veneta Regiono, tiu kiu montris ĝin povus esti mortkondamnita.

En la jaro 1830 Ciro Menotti ekigis ribelon por gvidi Italion al monarkia reĝimo, kun reĝo elektita de Kongreso. Tiam oni reprenis la trikoloron, kiu estis elektita de Giuseppe Mazzini en 1831 kiel simbolo de la *Juna Italio.*

Iom post iom la trikoloro de Giuseppe Mazzini flirtis en ĉiu parto de Italio dum ĉiuj revoluciaj ribeloj okazantaj inter la jaroj 1831 kaj 1848, ĉefe dum la "*Kvin Tagoj de Milano",* tiam oni hisis la flagon sur la tegmento de la *Duomo* kaj sur la *Porta Tosa*, la unua el la Milanaj pordegoj konkeritaj de la revoluciuloj gvidataj de Luciano Manara kontraŭ la aŭstria armeo.



Regnolando de Sardio depost 1848

Dum la Unua Sendependiĝa Milito, la 23-an de marto 1848, Carlo Alberto de Savoia, reĝo de Sardio, sendis siajn trupojn al Milano por helpi la revoluciuloj, kun la insigno de trikoloro, sur kiu estis aldonita la savoja blazono. Finfine, la 8-an de majo 1848, Trikoloro fariĝis oficiale flago de la Regno de Sardio kaj oni hisis ĝin en Torino (sidejo de la Senato).

Kvankam Italio estis ankoraŭ dividita laŭ regnoj kaj grand-duklandoj ne submetitaj al Savojo, preskaŭ ĉiuj uzis, ekde la jaro 1848, flagojn ruĝ-blank-verdajn, eble por esprimi deziron pri estonta unuiĝo de la tuta duoninsulo.

Reĝlando de la Du Sicilioj
(1848-1849)






Ĉefduka regno de Toskano
(1848-1849)



Respubliko de Sankta Marko




Reĝlando de Sardio kaj unua flago de Unuiĝinta Italio (1861-1946)

Dum la sendependencaj militoj, trikoloro akompanis armeon de Reĝo Vittorio Emanuele la 2-a de Savojo kaj oni hisis ĝin en ĉiu konkerita urbo. Iom post iom, ĝi konkeris la koron de ĉiu itala civitano.

Dum la dua mondmilito, oni uzis trikoloron kun la simboloj de la Nacia Liberiga Komitato kaj de la Itala Socia Respubliko, ĝis kiam, la 19-an de junio 1946, okaze de la naskiĝo de la Itala Respubliko, la Savoja blazono estis definitive forigita per artikolo n-ro 8-a de la Unua Dekreto de la Prezidanto de la Konsilio de Ministroj:

*“Ĝis kiam la Konstitucia Asembleo decidos alimaniere, la nacia flago konsistas el rektangula drapo, vertikale dividita en tri egalajn sekciojn respektive verda, blanka kaj ruĝa. La drapo devas esti du trionoj de la longo alta, kaj la tri koloroj devas esti lokigitaj kiel dirite, tiel ke la verdo estas apud la masto”*



La nuntempa Itala Flago
*Pantone* Tekstila

- Verdo 17-6153
- Blanko 11-0601
- Ruĝo 18-1662

Oni diras, ke la verdo estas la simbolo de arbaroj kaj ebenaĵoj; blanko la neĝo kaj ruĝo la sango de la mortintoj dum la militoj por konkeri unuiĝon kaj liberecon de Italio. La profunda signifo havigita al ĉi tiuj koloroj dum jarcentoj vokas idealojn de Justeco, Egaleco kaj Frateco, ankaŭ Digno, Demokratio kaj Prospero.

# La Belga Flago, ĉu laŭ-konstitucia ?

*Lukas Toczki*

Sciate, ke la nacia flago de Belgio enhavas tri egalajn vertikalajn striojn el koloroj nigra, flava kaj ruĝa. Tiuj koloroj estis prenitaj el tiuj de la Duklando Brabanto kaj ankaŭ la leono aperanta sur la nacia blazono.

La 26-an de aŭgusto 1830 komenciĝis la belga ribelo kiu sopiris pri sendependiĝo el la Nederlanda Regnolando. Oni hisis tiam en la Urbodomo de Bruselo trikoloran flagon kun horizontalaj (ne vertikalaj) strioj kun la jam diritaj koloroj: ruĝa, flava ka nigra. Tiel, kiam en februaro 1831, oni aprobis la konstitucion de la nova Belga Regno, ties artikolo 193-a proklamis jenon:

> *La Belga Nacio adoptas la kolorojn ruĝan, flavan kaj nigran, por la blazono de la Regno la Leonon Belgion kun la moto: Unuiĝo faras Forton.*



“Soldato de la Belga Revolucio”
Muzeo de la Armeo en Bruselo



Tuj poste iu pensis, ke la belga flago, kie aperis horizontalaj strioj, iom similis al tiu de Nederlando, regno el kiu fine la belga nacio sendependiĝis, do en la distanco ambaŭ flagoj povus esti konfuzitaj. Tiam, oni ekuzis flagon kun vertikalaj, anstataŭ horizontalaj, strioj. Oni diras ankaŭ, ke temis pri gesto je simpatio al la francoj.

Krome, la belgaj ŝipoj antaŭe ekuzis la vertikalajn striojn kun la nigra koloro tuj apud la his-flanko, kun la celo plibonigi la distingon de la flago el distanco. Tiel, la 15-an de septembro 1831, la belga registaro aprobis dekreton kiu ŝanĝis la striojn en la nacia flago, nun vertikalaj anstataŭ horizontalaj, kvankam la artikolo 193-a ricevis neniun ŝanĝon. Verdire, ĉi tiu artikolo parolas ne pri strioj, kvankam pro la ordo menciita en la konstitucio, tio estas: ruĝa, flava kaj nigra, ŝajnigas, ke oni sekvas logikan ordon supre-malsupren.



Flago de Belgio (Aŭg. 1830 - Sept. 1831)



Flago de Belgio depost Sept. 1831

**Sciu, ke...**

estas eble legi pasintajn numerojn de nia revuo. Vi nur devas viziti jenan TTT- paĝon:

www.esperanto.ac/vento

Aliro kaj legado de revuoj estas tute senpaga.




# Lastaj Informoj pri Flagoj



## Francio ŝanĝis la bluan koloron en sia flago

La franca Prezidento Emmanuel Macron decidis ŝanĝi la bluan koloron de la flago de Francio, omaĝe al la franca revolucio. Antaŭ tri jaroj la konsilisto Arnaud Jolens propozis al la prezidento ŝanĝi la bluan koloron de la flago staranta post la prezidento okaze de oficialaj deklaroj kaj diskursoj. Iom post iom, oni ŝanĝis ĉiujn flagojn flirtantajn ĉe la Prezidenta Palaco. Laŭ oficiala komuniko de la Prezidento, temas pri la blua koloro uzita dum la Franca Revolucio, ĝi ankaŭ estas la koloro de la francaj flagoj dum la unua kaj dua mondmilitoj.

En la jaro 1976, la Prezidento Valéry Giscard d'Estaing decidis uzi pli helan kaj brilan koloron bluan, simila al la eŭropunia flago.



Eksa kaj nuntempa blua koloro en la franca flago

# Nova flago por la brita Ĉambro de Komunuloj

La Ĉambro de Komunuloj estas la demokratie elektata ĉambro de la parlamento de Unuiĝinta Reĝlando de Granda Britio kaj Norda Irlando. Ĉi tiu institucio ne havis propran flagon, do la prezidanto de la Ĉambro petis dezajni standardon al Graham Bartram, ĉef-veksilologiisto de la Brita Instituto pri Flagoj. La novan flagon oni hisis la pasintan 11-an de majo.

Sur ĝi aperas ora baro-krado sub krono, ene de verda fono. Laŭ la prezidanto de la Ĉambro, la nova flago bonvenigos vizitantojn kaj oni hisos ekstere de la ĉambro okaze de solenaj aktoj. Rilate la simbolojn uzitajn, baro-krado estas la tradicia simbolo de la brita parlamento, dum la verda koloro reprezentas la Ĉambron de Komunuloj, kun verdaj seĝoj, tiuj ĉe la Ĉambro de Lordoj estas ruĝaj.



# Nova flago de la usona ŝtato Misisipio

La pasintan 3-an de novembro 2020, koincide kun la prezidenta balotado en Usono, okazis referendumo en la ŝtato Misisipio por decidi pri la proponita nova flago de tiu ŝtato. La 69% el voĉdonoj akceptis la novan dezajnon. La nova flago anstataŭigas tiun adoptitan en la jaro 1894. La eksa flago montris en supera kantono la flago de la Konfederaciitaj Ŝtatoj de Ameriko, ŝtato kreita en la jaro 1861, kies fondiĝo kaŭzis enlandan militon en Usono. La Konfederacio ĉesis ekzisti pro ties malvenko en tiu milito.

Misisipio estis unu el la ŝtatoj kiuj aniĝis al tiu Konfederacio. Lastatempe la konfederacia flago estas konsiderata kiel rasisma simbolo, pro la fakto, ke ĝi permesis kaj favorigis la sklavecon. Do, antaŭ kelke da tempo aperis

proponoj por forviŝi la konfederacian el la misisipia flago. Fine, oni dezajnis novan simbolon.




Sur la nova flago aperas tri vertikalaj strioj, alterne ruĝa, blua kaj ruĝa. Flanke de la blua centra strio troviĝas du oraj strietoj. Meze de la flago aperas magnolia floro, konsiderata kiel simbolo de la ŝtato. Ĉirkaŭ la floro troviĝas dudek unu steloj, unu el ili pli granda. Misisipio estis la dudeka ŝtato aliĝinta al Usono, la pli granda ora stelo simbolas la indiĝenajn popolojn. Sub la stelo aperas la moto *"In God We Trust"* (Ni fidas je Dio).

## Prezentita la flago de la Indiĝena Popolo Ĉango

La popolo Ĉango, ankaŭ konata kiel Kamanĉako, estas antaŭ-Kolumba indiĝena popolo de Sud-Ameriko. Nuntempe ili troviĝas en la nordo de Ĉilio. Al ĉi tiu popolo apartenas preskaŭ 5.000 homoj . La pasintan jaron la Nacia Konsilio de la Ĉanga Popolo, al kiu apartenas pli ol 30 sociaj kaj kulturaj asocioj, aprobis sian flagon.



# La fotografaĵo de niaj legantoj



Eŭropunia kaj germana flagoj ĉe la Germana Parlamento. Berlino



*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*


*NI ATENDAS VIAJN FOTOGRAFAĴOJN !*

# Kiel faldi flagojn

Cristina Bollini (Italio)


Flago devas esti solene malhisata kaj, kiam ĝi estas forigita de la masto, oni devas meti ĝin bonorde kaj ĝuste faldita.

En Italio, ekzemple, nur la verda koloro devas esti videbla post la faldo, do, oni devas agi laŭ ĉi tiel:





Oni faldas vertikale la ruĝan strion sur tiun blankan (2-3); poste la verdan strion sur la ruĝan (4 - 5); nun videblas nur la verdan strion (6); oni devas refaldi horizontale la verdan strion (7); kaj fine faldu ĝin denove (8).

Rilate la usonan flagon, ĝi devas esti multfoje horizontale faldita (2), tiel ke la steloj devas esti videblaj elesktere; poste la dekstran parton oni devas faldi laŭ malgrandaj trianguloj (3). Daŭrigu en la sama maniero, ĝis kiam estas videblaj nur la steloj ene de la triangulo fine rezultita (4).






La brita flago faldiĝas ĉi tiel:

- faldu ĝin duone horizontale (2)
- faldu ĝin denove (3)
- renversu ĝin
- laŭ trionoj faldu la du eksterajn trionojn en tiun centran (4)
- volvu ĝin (5)
- fine oni devas ligi ĝin per malpeza kordono.

◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇◇

## Demarŝoj por la fondiĝo de Veksilologia Faka Asocio en Esperantio.

Kiel Vi eble jam scias ekde la unua numero de nia revuo ni strebas cele la fondiĝon de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo (V.E.N.T.O.). Temos pri faka asocio por flag-amantoj scipovantaj aŭ simpatiantaj al internacia lingvo.

Kun tiu celo ni redaktis proponon por statuto, kiun Vi povos legi sur http://esperanto.ac/statuto-de-vento/ Kompreneble temas nur pri propono. La statuto estas redaktita konforme al hispana leĝaro, pro la fakto, ke plimulto el la iniciatoroj de la ideo leĝigi veksilologian asocion estas hispanoj, sed kompreneble, temas pri internacia organizo en kiu ĉiuj rajtas partopreni, kiel membroj aŭ estraranoj.

Por fondi oficiale la asocion, post aprobo de la statuto kun la necesaj modifoj aprobitaj de la plimulto el partoprenantoj, ni deziras organizi retan kunvenon pere de la sistemo *Google Meet* . Ni provos organizi ĝin dum tago kaj horo kiel eble plej konvena por ĉiuj. Tio okazos, en januaro 2022. Se Vi deziras partopreni sciigu tion al ni, kaj ni kontaktos kun Vi por informi pri la konkretaj horo kaj dato, kune kun informo pri la ligilo al la ret-kunveno. Kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac

# Tokio '64 kaj Meksiko '68<br>Flagoj kaj Olimpikoj

✍ *José María Rodríguez (Hispanio)*

Kiam ne ekzistis interreto la plej bona fenestro por vidi ĉiujn ŝtatajn flagojn okazis ĉiu kvara jaro, temis pri la Olimpiaj Ludoj. Eĉ nuntempe estas granda plezuro vidi sportistojn paradi komence kaj fine de la ludoj, kiam aperas ĉiuj partoprenantoj kun ties naciaj flagoj.


Kompreneble, de tempo al tempo okazas bizaraj okazintaĵoj kie ĉefrolas flagoj en Olimpikoj. Ene de ĉi tiu malgranda artikolo mi parolos pri du el ili, okazintaj en la Olimpikoj de Tokio en la jaro 1964 kaj en Meksiko en 1968.

**TOKIO '64**

Partoprenis en ĉi tiuj olimpikoj 93 naciaj komitatoj. Sciate, ke nuntempe pli ol 200 landoj partoprenas, tamen en la jaro 1964 multaj el la nuntempaj ŝtatoj estis ankoraŭ kolonioj. Unu el tiuj naciaj komitatoj estis tiu de Norda Rodezio. Ĉi tiu teritorio estis brita protektorato en sudcentra Afriko. En la jaro 1953 Norda Rodezio federaciiĝis al la teritorio Niazalando (la nuntempa Malavio). Tamen, ĉi tiu federacio daŭris ĝis la jaro 1964. Malavio sendependiĝis en la monato julio kaj Norda Rodezio, sub la nomo Zambio, en oktobro 1964, ĝuste la 24-an de oktobro 1964.

La sola partopreno de Norda Rodezio en Olimpiaj Ludoj okazis en tiu de Tokio. Partoprenis sub la nord-rodezia flago dek du sportistoj en kvin sportoj. Ĉi tiuj Olimpikoj okazis ĝuste de la 10-a de oktobro 1964 ĝis la 24-a de oktobro. Kiel jam dirite, Norda Rodezio ĉesis ekzisti en la tago kiam finiĝis la Olimpikoj de Tokio, tio estas la 24-a de oktobro 1964, siafoje Zambio naskiĝis oficiale tiam. Do, eblas demandi: *kiu nacia komitato partoprenis reale en la Olimpiaj Ludoj de Tokio en la jaro 1964? Ĉu Nord-Rodezio? Ĉu Zambio?* La respondo troviĝas en la flagoj uzitaj okaze de la inaŭgura kaj de la fina parado de la sportistoj.



Solena inaŭguro de la Olimpiaj Ludoj. La 10-an de oktobro 1964. Reprezentanto de Norda Rodezio paradas kun sia flago.






Fermo de la Olimpiaj Ludoj. La 24-an de oktobro. Reprezentanto de Zambio (eksa Norda Rodezio) paradas kun sia nacia flago.


Jes, sportistoj de tiu teritorio partoprenis, sed laŭlonge de la Olimpiaj Ludoj ili uzis malsimilajn nomojn por la ŝtato kaj kompreneble ankaŭ malsimilan flagon. Bizara afero, ĉu ne?

**MEKSIKO '68**

La dua anekdoto rilate flagojn en Olimpikaj Ludoj okazis en Meksiko en la jaro 1968. Unue oni devas diri, ke post la fino de la hispana intercivitana milito (1936/1939), kies rezulto estis la malapero de la Hispana Respubliko kaj la atingo de la politika povo en Hispanio fare de la generalo Franko, nur du ŝtatoj en la mondo daŭre agnoskis el la diplomatia vidpunkto, la eksan Hispanan Respublikon, nome Meksiko kaj Jugoslavio. Meksiko eĉ faciligis la tiean alvenon de multaj hispanaj ekziliitoj, eĉ la sidejo de la registaro de la respubliko en la ekzilo troviĝis en Meksiko ĝis la jaro 1946. Ĉi tiu situacio daŭris ĝis la jaro 1977 kiam, jam forpasinta la diktadoro Franko, Hispanio kaj Meksiko rekomencis siajn

diplomatiajn rilatojn. Tamen, malgraŭ tiu ne-ekzisto de diplomatiaj rilatoj inter Hispanio kaj Meksiko de 1939 ĝis 1977, verdire komerco kaj kulturaj rilatoj inter ambaŭ ŝtatoj estis ege intensaj.

Nu, kiel dirite, en la jaro 1968 Meksikio organizis olimpiajn ludojn. Temis pri la unuaj olimpiadoj okazantaj en Latinameriko kaj ankaŭ, unuafoje, lando kiu ne apartenis al la unua mondo el la ekonomia vidpunkto organizis olimpikojn. Alie, la olimpiadoj estis ege sukcesaj kun la partopreno de 112 ŝtatoj. Meksiko propagandis dise kaj abunde siajn olimpiajn ludojn tra la tuta mondo, tiel, oni eldonis belegajn reklamilojn, inter ili serio de poŝtkartoj kie aperis ludoj de la antikvaj meksikanoj, dum la Majaa civilizacio. Sur kelkaj el tiuj poŝtkartoj aperis flagoj de la landoj partoprenantaj en la Olimpiaj Ludoj. Sed jen rimarkinda kuriozaĵo, sur unu el tiuj poŝtkartoj aperis hispana flago, apud tiu de Usono, Britio, Francio... sed, pro la fakto, ke la hispana registaro agnoskita de Meksiko estis tiu de la Hispana Respubliko, aperis en tiu poŝtkarto ties flago, kiu ne estus la standardo montrita de la hispanaj sportistoj.







Flago de la Hispana Respubliko
1931 - 1939
Ekziliita registaro 1939 - 1977

Ĉu la dezajnisto de la poŝtkarto kredis, ke reale tiu estis la hispana flago? Oni ne scias, tamen estas bizara afero, ke oni diskonigis la partoprenon de lando en olimpiaj ludoj de lando per flago kiun ne uzus la sportistoj.

# Veksilologia kuriozaĵo

Filipinoj uzas malsimilan flagon okaze de milita konflikto. Jes, laŭ la filipina protokolo, se Filipinoj deklaras milito-staton la flago devas esti uzita inverse, tio estas, kun la ruĝa strio supren. Tiu ago volas indiki, ke en tiu situacio la sango kaj kuraĝo de la soldatoj devas situi sur la plej alta loko.




Filipina flago dum paca tempo



Filipina flago dum milito-stato

Tamen, tiu uzo povas okazigi miskomprenojn, se oni ne konas sufiĉe bone la filipinan protokolon. Ekzemple, en septembro 2010 okazis en Novjorko renkontiĝo de la Asocio de Sud-Orientaj-Aziaj Nacioj. La usonaj organizantoj lokigis la filipinan flagon ĉe la podio, apude al la ceteraj flagoj de la ĉeestantaj ŝtatoj, sed tiufoje oni mise starigis la filipinan flagon kun la ruĝa strio supren. Rezulte, la usona registaro devis pardonpeti pro tiu eraro, feliĉe tio ne okazigis diplomatian incidenton.



Renkontiĝo de Asocio de Sud-Orientaj Aziaj Nacioj. La filipina flago, dekstre, starigita kun ruĝa strio supren

# La angulo de la blazonoj: *Moldavio*

La apero de blazono sur flago povas esti tre grava afero, ĉefe se la flagoj de du apudaj ŝtatoj tute similas. Tio okazas al la flagoj de Rumanio kaj Moldavio. Ambaŭ landoj posedas saman kulturon, lingvon kaj flagon. Nur la blazono kiu aperas sur la moldava flago, kaj la proporcioj de la flagoj, eblas distingi ambaŭ simbolojn.



Moldava flago (proporcio 1:2)



Rumana flago (proporcio 2:3)

La moldava blazono konsistas el ŝildo dividita horizontale laŭ du partoj, la suba estas ruĝa kaj la suba blua. Sur ambaŭ partoj videblas ora kapo de uro, temas pri sovaĝa bovo kiu formortis dum la 17-a jarcento. Inter la kornoj de la uro aperas okpinta ora stelo aŭ suno. Maldekstre de la kapo aperas kvin-petala rozo, dekstre kreskanta duonluno.

La ŝildo situas sur brusto de aglo, portanta en la beko oran krucon. La aglo alprenas per sia dekstra klifaro olivarban branĉon kaj per la maldekstra oran sceptron.

La aglo reprezentas la kulturan similecon kun Rumanio. Rilate la uran kapon ĝi memoras la tempon kiam Moldavio unuiĝis al Besarabio. La okpintan stelon oni povas interpreti kiel antikvan simbolon de saĝeco. La rozo kaj la duonluno reprezentas la moldavan kulturon.

Rilate la moldavan blazonon sur la nacia flago dirindas kuriozaĵo, tiel, ĝis la jaro 2010 la blazono nur aperis sur la averso de la flago, tamen en tiu jaro oni decidis, ke ĝi devus aperis sur ambaŭ flankoj, tio estas sur la averso kaj la reverso, sed kun eta distingo, tiel la aglo sur la aversa parto de la flago rigardas

maldekstren, male en la reverso dekstren, kun la celo atingi simetriecon sur ambaŭ flankoj de la flago.



Blazono de Moldavio





# Flagoj kaj poŝtmarkoj:

## *Kiam ŝtato malaperas*




De tempo al tempo ŝtato malaperas, do ties flago jam ne plu aperas. La sola okazo revidi tiujn jam ne-uzitajn flagojn estas traserĉi antikvajn dokumentojn kie tiuj flagoj videblis. Unu el tiu estas poŝtmarkoj. Jen la kazo de Sud-Vjetnamo.

Suda Vjetnamo estis ŝtato troviĝinta sur la suda teritorio de la nuntempa Vjetnama Socialista Respubliko. Post la dua mondmilito Vjetnamio, franca kolonio, luktis cele sian sendependiĝon. Post batalo en *Dien Bien Phu*, francoj retiriĝis el la teritorio, naskiĝis tiam Vjetnamio, kvankam kun registaro en la norda parto apogita de Sovetunuiĝo kaj Ĉinio kaj alia apogita de Usono en la sudo. Do, el praktika vidpunkto aperis du ŝtatoj: la Demokratia Vjetnama Respubliko en la norda parto kaj la Vjetnama Respubliko en la sudo. Temis pri alia okulfrapa ekzemplo de la "Malvarma Milito" inter Usono kaj Sovetunuiĝo.

Por Usono estis de fundamenta graveco la ekzisto de ne-socialista ŝtato en Vjetnamio, oni deziris eviti la iom-post-ioman influon de Sovetunuiĝo en tiu azia regiono. Do, Sud-Vjetnamio fariĝis preskaŭ pulĉinela registaro kontrolita de Usono. Komence de la 6-a jardeko de la pasinta jarcento komenciĝis terura milito. Sudaj gerilistoj kaj la armeo de Nord-Vjetnamio luktis dum deko da jaroj en la arbaroj kaj ankaŭ en la urboj por atingi la kompletan reunuiĝon de Vjetnamio, laŭ la modelo reganta en la norda parto. Usono sendis tien miloj da soldatoj por eviti la falon de la sud-vjetnama registaro. Kunlaboris kun ĝi ankaŭ aliaj ŝtatoj kiel Sud-Koreio, Tajlando, Filipinoj, Aŭstralio, Nov-Zelando kaj la insulo Tajvano.

En la jaro 1968, kiam la milito pleje akriĝis, Sud-Vjetnamio eldonis serion de poŝtmarkoj kun la celo danki la militan helpon de tiuj ŝtatoj, temis pri la tiel nomitaj "kun-aliancanoj". Sur la poŝtmarkoj aperis la flagoj de tiuj ŝtatoj kaj ankaŭ tiu de Sud-Vjetnamio. Kompreneble la usona flago estis la plej videbla, ĉar preskaŭ ĉiuj soldatoj apogantaj Sud-Vjetnamio venis de Nord-ameriko.















Flago de Sud-Vjetnamio

Kiel finiĝis ĉi tiu historio? Nu, post akordo subskribita en Parizo, Usono retiris siajn soldatojn en la jaro 1973. En la jaro 1975 la armeo de Nord-Vjetnamio eniris en Sajgonon, suda ĉefurbo. En la monato julio 1976 Suda Vjetnamio integriĝis en la nuntempa Socialista Vjetnama Respubliko.

# *Trovu la eraron !*






La pasintan 28-an de oktobro okazis en la hispana urbo Trujillo (prononcu: *Truĥiĵo)*, renkontiĝo de la portugala kaj hispana registaroj. En la simbolo dezajnita tiu-okaze aperas kurbigitaj hispana kaj portugala flagoj. Tamen, la portugala flago aperas kun ties koloroj, verda kaj ruĝa, inverse lokigitaj.



Reprezentaĵo de la portugala flago en la simbolo de la hispan-portugala renkontiĝo. Oktobro 2021



Flago de Portugalio

# *VENTO jam atingis sian 10-an numeron !*

La sola veksilologia revuo en la internacia lingvo jam atingis sian 10-an numeron. Ne nur kunlaborantoj sed ankaŭ legantoj faris tion ebla. Multan dankon al tiuj kiuj, post ĉiu numero eldonita, kontaktis kun la redakcio por opinii, proponi temojn kaj ankaŭ por sciigi pri vorto ne tro bone uzita. Dankon al ĉiuj!

Tiom da artikoloj, desegnaĵoj, fotoj ne povas malaperi el la reto, do, estas necese ankaŭ diskonigi ilin pere de presita libro. Tiel, fine de la venonta monato januaro 2022 aperos la libro *VENTO 1-10*, kiu enhavos ĉiujn numerojn jam eldonitaj de nia revuo. Pro evidentaj ekonomiaj aferoj ne estos eble eldoni grandan kvanton da libroj, unue ni pripensis eldoni 50 ekzemplerojn. Do, se Vi deziras rezervi ekzempleron, kontaktu kun nia redakcio. Rilate la koston, kompreneble tiu afero estos konata kiam la libro eliros el la presejo, tamen ni kalkulas, ke plejeble la kosto povos esti ĉirkaŭ 20 eŭroj (22,63 usonaj dolaroj).

Do, ne hezitu, se Vi ŝatas nian retan revuon, Vi meritas havi ĝin en via biblioteko.

# *La libro "VENTO 1-10" aperos en januaro !*



## Kiel kunlabori kun *VENTO*

• Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

• Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

• Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

• La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

• Memoru, ke nia ret-adreso estas: cordoba@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:

Revuo VENTO
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*VENTO* aperas tri-foje en la jaro (aprilo – aŭgusto – decembro).



# Veksilologia Humuro




*Verdire, li devus nomiĝi "Kapitano Porto-riko" aŭ "Kapitano Liberio",anstataŭ "Kapitano Ameriko" !*

Notu la adreson de nia revuo: cordoba@esperanto.ac

Antaŭaj numeroj libere legeblas ĉe: www.esperanto.ac/vento

La adreso kaj la TTT-paĝo estis afable havigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. www.esperanto.ac

Artikoloj, kritikoj kaj kiu ajn kunlaboro estos ĉiam bonvenaj.


UNUA
LABORISTA
ESPERANTISTA
KONGRESO
PARIZO
1914